



*Senlime*

Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno

En cas de non-distribution, renvoyer à

H. Lentzen

Feldweg 20

BE-4701 KETTENIS

Tel. xx-32-(0)87-55.43.26

E-mail : [lentzen@gmx.net](mailto:lentzen@gmx.net)

**Editeur responsable**

**Responsa eldonanto +**

**Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: [jmjsenlime@planetinternet.be](mailto:jmjsenlime@planetinternet.be)

J.-M. Jacques, rue Joseph Wauters 5,

BE-4800 VERVIERS

**Informatie in het Nederlands**

**Informoj en la nederlanda:**

ni bedaŭrinde devas peti vin ke vi

provizore bonvolu uzi alian skatolon

(*Senlime* sercxas novan kunlaboranton

anstataŭe de T. Sinno, kiu

translogxiĝis al fora loko...).

**Informationen auf deutsch**

**Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: [hogen@t-online.de](mailto:hogen@t-online.de)

K. Hogen, Schütz-v-Rode-Str. 43

DE-52134 HERZOGENRATH

Tiu-ĉi informilo aperas kvarfoje en jaro.

**Jara abono / allĝo : 10 EUR**

**Belgio** : konto 000-0245571-64

Esperanto-Grupo, rue Donckier 22,

BE-4800 VERVIERS

**Nederlando** :

ni bedaŭrinde devas peti vin ke vi

provizore bonvolu uzi alian konton.

**Germanio** : konto 6623201,

Sparkasse Aachen (BLZ 390 50000)

Im Pesch 20

DE-52134 HERZOGENRATH

Kotizoj do principe pagendas dum la

novjara periodo (decembro aŭ januaro).

La kotizintaj membroj principe ĝuas

rabaton okaze de aliĝo al Trilanda

Renkontiĝo organizita de *Senlime*.

# La Voĉo de Amikejo

Informilo pri **Senlime** kaj **Esperanto** en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

LIEGE-ESPERANTO

kaj

*Senlime*

invitas vin al


## Trilanda Renkontiĝo

en **Lieĝo** (Belgio) okaze de la centa naskiĝ-datreveno de la  
mondfama verkisto

# Simenon

Provizora programo

1. Malfermo de akceptejoj – bonvena kafo
2. Giganta « *Kluedo* »
3. Promenado « *laŭ la spuroj de Simenon* »
4. Tagmanĝo (speciala Simenon-menuo)
5. Vizito de la mega-ekspozicio  
« *Simenon... unu jarcento !* »



# Simenon tuta

**Simenon, mortinta en 1989, estintus 100-jara pasintan 13-an de februaro.**

## La verkisto

Li ĉiurilate estas la verkisto je ĉiaj superlativoj, je ĉiaj rekordoj. La plej legita en la tuta mondo, la plej tradukita, la plej adaptita por la kinarto kaj la televido kaj, kompreneble, la plej produktema : Georgo Simenono verkis, propranome aŭ sub multaj kaŝnomoj, ne malpli ol 431 titoloj !

Certe ja tiu produkto enhavas nutrigan literaturon, verketojn menditajn por du-eŭrajn romanojn sentimentalajn, aventurajn aŭ triviale malprudajn (*Liquettes au vent* [Ĉemizoj en la vento], *Une petite dessalée* [Sensaligita virineto], k.t.p.). Tio ne malhelpas ke la denaskulo el la kvartalo « **Outremeuse** » [Preter-Moza], en Lieĝo, sukcesis tiun akrobataĵon esti legata de supre ĝis malsupre de la socia skalo, samtempe esti la plej populara kaj esti konsiderita de sammetianoj kiel unu el la plej grandaj en la 20a jarcento. Cetere, okaze de la centa datreveno de lia naskiĝo, la ĉiukategoria ĉampiono de la poŝ-kolektoj eniros en la Plejado-n !

## La homo

La homo mem estas kontraŭdira kaj malsimpla. Kreinto de tiom specifa universo, tiu de senkaraktera cxiutago, grizaĵo, homa neboneco, senbrilaj kaj tragikaj estuloj murigitaj en iliaj suferoj, Simenon mem faris el sia vivo trepidanta romano. Redaktisto 16-jara en *La Gazeto Lieĝa* – kie li redaktis biletojn vigle kontraŭsemidaj - , noktovagulo dum la frenezaj jaroj kaj amanto de Jozefina Baker, raportisto en Afriko, riverŝipisto, amerika brutfarmisto aŭ

svisa kastelmastro, li senĉese surscenigas sian vivon. Troemega pri verkado, vojaĝoj, domoj kaj, precipe, virinoj – plejofte je tarifaj plezuroj – (10000 ! konfidos li al sia amiko Federiko Fellini), la viro, kiel la verkisto, ja estas eksternorma. La 19a jarcento havis Balzac kaj Zola. La 20a jarcento havis Simenon, kiu estis ĝia « malpardonema kaj genia klinikisto », kiel klarigas la bonega *Simenona Pasio* (Textuel), unu el la verkoj kiuj plej valoras en la pluvego da aperoj okaze de tiu centjarigo abunde festata en Lieĝo kaj kies ĉefpunkto certe estas la granda ekzpozicio *Simenon... unu jarcento !*

## La ekspozicioj

*Euroculture*, ĉampionoj pri eduka kaj ludiga spektaklo, kreintoj de la mega-ekzpozicioj *J'avais 20 ans en 45* [Mi estis 20-jara en 1945] kaj *Je n'aime pas la culture* [Mi ne ŝatas la kulturon], kiuj jam organizis en 1993 sukcesplenan ekzpozicion *Tuta Simenon* tiun fojon servas al ni (ne kronologian sed teman) gigantan kaj teatran *Simenon... un siècle !*

Temas pri biografia fresko kiu, tra 2500 m<sup>2</sup>, enigas la vizitanton laŭ tridimensia promeno centrigita al 13 temoj, por malkovri la vivon, la verkon, la epokon de Simenon.

## Vizito

En 1900-a ĝardenplaco oni malkovras la junuljarojn de la verkabunda skribisto. Poste enŝipiĝo en ŝipego flanke de Gide, Hemingway... por travivi la grandajn raportojn de la lieĝano. La polickomisarejo de Maigret kompreneble ĉeestas sed ankaŭ aliaj la lokoj de aliaj famaj herooj el policromanoj :

la apartamento de Ŝerlok Holmes, la kupeo de Herkulo Poirot en la Orienta Express, la kadavrejo de la leĝista kuracisto Kay Scarpetta, k.t.p. La universo de iliaj romanoj, filmscenejoj, iliaj skribaj ritoj kaj iliaj rilatoj al la virinoj iĝas temoj de scenoj kaj ludaj restarigoj. Se temas pri la fama « Simenona etoso », jen ĝi estas ! Vi alvenas sur nebula kajo : platŝipo, kluzo, paŝponteto ; la vetero estas griza kaj malagraba... Vi nun nur reiru en Lieĝo, por la gvidita promenado *laŭ la spuroj de Georgo Simenon*.

## Dek-unu legendaj verkoj

Verkisto kaj eldonisto, Johano-Baptisto Baronian ankaŭ estas eksperto pri la verkaro de Simenon, al kiu li dediĉis du eseoj. Jen lia selekto :

1. *Le Charretier de La Providence* (1931)
2. *Le Chien jaune* (1931)
3. *L'Assassin* (1937)
4. *Le Bourgmestre de Furnes* (1939)
5. *Je me souviens...* (1945)
6. *Maigret à New-York* (1947)
7. *Les Anneaux de Bicêtre* (1963)
8. *La Chambre bleue* (1964)
9. *Maigret à Vichy* (1968)
10. *Mémoires intimes* (1981)

Kaj kompreneble ne maltrafu : *Maigret hezitas*, esperantigita de Daniel Luez, eldonejo Sezonoj, Jekaterinburg 1999 (vidu p. 6)

Laŭ artikolo aperinta en  
LE VIF/L'EXPRESS  
7/2/2003

J.-M. Jacques

# ESPERANTO

## Euxregiona kalendaro 2003 (4)



Celante plifortigi la interpopolan interkompreniĝon, helpe de la internacia lingvo esperanto, precipe en la Eŭregiono Moza-Rejno, **Senlime** publikigas, por siaj kotizintaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono.

Ĝi eventuale povas enhavi la programojn de la lokaj grupoj aŭ aktivajn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** principe okazas ĉiun trian vendredon de monato (krom vintre kaj ferie) en kultur-centro "Select", Lütticherstr. 264.

Ĝi aperas papere kaj rete (ankaŭ en formato legebla de iMode-aparatoj).



**Bonvenon al cxiuj... sed, pro eblaj program-sxangxo, nepre kontaktu la lokan organizanton aux grupon antaux ol partopreni aktivajxon.**

**01-03 Malfermo de ttt-ejo pri Senlime** por i-mode aparatoj (<http://Senlime.ifrance.com>).

**02-13** BE-Liège, **datreveno de naskigxo de Georges Simenon**, malfermo de la jaro « Simenon » (memorcele).

**03-21** 19h30 BE-Kelmis, Select: **komuna kunveno de la lokaj grupoj** (prelego de M. Schrymecker pri la pontego en Moresneto -ellaboro de nia agadplano 2003 - diversajxoj). Inf. M. Schrymecker.

**04-19 promenado**  
**14h30** - rendevuo cxe la auxuvoja eli-ro de Battice (parkejo)

- promenado (pieda kaj/aux bicikla) lauxlonge de la iama fervoja linio 38 (Chenee - Herve - Battice - Aubel - Plombimonto)

**16h00** - pauxzo en iu trinkejo - dauxrigo de la

promenado (reiro)  
**18h00** Bufeda restoracio en "La Mezzanino" (Ayeneux)

Kosto : 24 EUR (kun trinkajxo kaj kafo)

N-B: bonega kuirado (malvarma bufedo, varma bufedo, desertoj,...). Inf. R. Demarche.

**05-10** 09h30 BE-Kelmis, Select: komuna **Trilanda Renkontigxo / Revelo-tago** en Herzogenrath (Aachen)

Provizora programo:

- diservo
- prelego
- komuna tagmangxo
- vizito de monahxejo Rolduc (Herzogenrath)

Inf. K. Hogen.

**06-09** 14h00 BE-Kelmis, Select: festo de Neuxtrala Moresneto - foriro de promenado al la cxirkauajxo de la fervoja pontego (dato kaj rendevu-loko konfirmotaj). Inf. M. Schrymecker.

**Somera paŭzo**

**09-21** 09h30 BE-Liège, **Trilanda Renkontigxo pri Simenon** : vizito de ekspozicio "Simenon: un siècle !" kaj modernigita urba rondiro laux la « spuroj de Simenon ». Inf. D. Dupont.

**10-17** 19h30 BE-Kelmis, Select: **komuna kunveno de la lokaj grupoj** (prelego de R. Demarche pri "Jemeno" -2a parto). Inf. R. Demarche.

**11-21** 19h30 BE-Kelmis, Select: **komuna kunveno de la lokaj grupoj** (Prelego de M. Schrymecker pri la pentristo Millet). Inf. M. Schrymecker.

**12-14** 11h15 BE-Kelmis, Select: **Zamenhof-festo** (1859-12-15 naskigxis Zamenhof ; ni cxiujare festas tiun datrevenon, kiu farigxis tago de literaturo kaj libro en esperanto, per komuna fest-tagmangxo kaj kulturaj eroj). Konfirmota.



**La komitato de Senlime petas ĉies helpon por organizi kunvenojn kaj precipe trilandajn renkontiĝojn.**

**Ĉu vi havas ideon pri vizitebla loko (eble aparte facila ebleco por tio ?), pri prelego, iu gaja vespero... ? Nepre konatigu ĝin !**



## TRILANDA RENKONTIĜO

**Loko:** Parohxsalono maldekstre malantaux la prejxejo "Sankt Maria Himmelfahrt", stratangulo Kleikstrato 56/58 / Eygelshovener strato (vidu la rektangulon sur la mapo)

**Automobile: Vi atingas H´rath per la autovojo 4 (E314). Prenu la eliron n-o 2 Laurensberg/Herzogenrath**  
Post la eliro iru en la direkto de H´rath – Centro. Vi eniras la mapon cxe la sagforma indikilo („Alte Str.“). Sekvu la straton, kiu malaltigxas en la kaldronon de H´rath.

1. Se vi volas al la **parkdomo Albert-Steiner-str.** apud la posxto, sekvu la grandan straton tra la urbo kaj **iru la unuan straton maldekstren post la fervoja ponto** per indikilo aux simbolo „Centra parkdomo“. 100 metroj poste maldekstren. Nur la du plej altaj ebenajxoj estas nuntempe senkostaj.
2. Se vi volas al la **parkejo Bergerstrato**, sekvu la grandan straton tra la urbo kaj **iru maldekstren post la betona turo de la pregxejo**. Poste prenu la duan straton dekstren.

**Trajne:** Forlasinte la stacidomon, iru dekstren, poste denove dekstren en la Kleikstr. Post la ponto vi vidos la celon.

## Programo:

- 09:00-10:00 Akcepto kaj bonvena kofeina akvo  
 10:00-12:30 *Prezentado de la Revelo-grupoj, de Senlime, prelego, diservo*  
 (punktoj precizigotaj)  
 12:30-14:00 Komuna batalo cxe la varma bufedo  
 14:30-15:00 *Survoje...auxtomobile aux piede...*  
 15:00-16:30 Vizito de la monahxejo ROLDUC  
 17:00-18:00 Dolcxa adiauxo kun kuko

La tuta arangxoamplexas: Kafoj, kuko, bufedo (Terpomajxoj, salato, leguma plado, porkajxoj), la vizito kaj la luprezo por la pregxejo. **Kotizo: 25 EUR.**

Specialaj vegetaranaj mangxajxoj bedausrinde ne estas akireblaj. Tiu, kiu ne volas kunmangxi, devas sercxu ion en la urbo. Jes, ni devas mem gargari la uzitajn telerojn, forkojn, tranxilojn, ktp. Sed ekzistas komforta industria gargarmasxino! La salono estu forlasita en balaita stato. Volontuloj estas deziritaj! Dankon!

**Tranoktado:** Cxiu tranoktemulo devos mem organizi sian liton!

1. Junulargastejo Collinshof en Akeno: 20 EUR po lito en 4-litcxambro, matenmangxo kaj littuko inkluditaj. Informoj cxe Rosa Ebel, [eweri@t-online.de](mailto:eweri@t-online.de), 02151-557717
2. Hoteloj: Prezoj preskaux identaj, unupersona cxambro 43-48 EUR, dupersona (2pcx) cx. 72-78 EUR, matenmango inkludita. Landa kaj urba numeroj estas 0049 (0)2406  
 A "Hotel zur Brücke" Kleikstr. 42, tel.: 92040, apud la kunvenejo  
 B "Eurode Live Hotel Mertens", Bergerstr. 14, tel.: 95510, faks.: 955151, pli trankvila ol A  
 C "Stadthotel", Rathausplatz 5, tel: 3091, faks: 4189, 2pcx 65 EUR, dua tranokto 35 EUR, pli fore de la kunvenejo


Aligxu nepre gxis la 25-a de aprilo 2003, por demandoj mi estos cxiam je via dispono!

**Klaus Hogen, Im Pesch 20, D-52134 Herzogenrath**  
**0049(0)2406-7809 (telefone, vespere) [hogen@t-online.de](mailto:hogen@t-online.de) 0049(0)2406-7706 (telekopiilo)**

Antauxpagonte la kotizon al la kontoj de Senlime vi faciligos la laboron de la organizanton kaj kasiston. Koregan dankon!!!

**Germanio** konto 6623201 BLZ 390 500 00 (Sparkasse Aachen)  
**Belgio** konto 000-0245571-64 de Esperanto-Grupo, rue Donckier 22, 4800 VERVIERS  
**Nederlando** konto 17 47 592 de J. A. Hanse, Rothenbachpark 44, NL-6063 NM VLODROP

*Mi atendas cxiujn.... Kore salutas vin !*



<p><b>V</b>erviersa <b>A</b>ngulo <b>V</b>erviersa <b>E</b>esperanto <b>G</b>rupa</p>	<p><b>Tra Maigret al la homa naturo</b> <i>Maigret hezitas, de Georges Simenon, esperantigita de Daniel Luez, eld. Sezonoj, Jekaterinburg 1999.</i></p>	
<p><b>Comité de V.E.G.:</b></p> <p>Président: J. Jacob Petit Jonckeu 18 4803 POLLEUR Tél. 087/22.10.79</p> <p>Trésorier: R. Demarche Rue Donckier 22 4800 VERVIERS Tél. 087/22.68.18</p> <p>Secrétaire: J.-M. Jacques Rue Joseph Wauters 5 4800 VERVIERS Tél. 0486/947.957</p> <p>V.E.G. dépend de l' Association pour l'Espéranto (A.P.E.) M. Delforge Rue des Glacères 16 6001 MARCINELLE</p>	<p>Post kiam <i>Sezonoj</i> jam eldonis la unuan esperantan libron pri Sherlock Holmes, nun ĝi prezentas al ni la unuan pri Komisararo Maigret, la Pariza detektivo, kreita de Georges Simenon.</p> <p>La metodoj de tiuj du fikciaj detektivoj forte malsamas. Dum Holmes estas scienca kaj logika, Maigret plejparte uzas sian intuicion. En la Holmes-rakontoj la enigmo kaj ties solvo estas kernaj. En la Maigret-rakontoj la psikologio de la personoj estas eĉ pli grava.</p> <p>Plej ofte en la sepdek-kelkaj Maigret-romanoj la Komisararo eniras apartan etoson, pri kiu komence li komprenas malmulte. Kutime murdo okazis kaj li vizitas kaj la lokojn kie ofte troviĝis la murdito kaj la homojn kiujn tiu konis. Iom post iom li komprenas la psikologion de la murdito kaj ties konatoj kaj finfine li komprenas kiu lin mortigis kaj kial.</p> <p>Tre bone Daniel Luez elektis traduki <i>Maigret hezitas</i>. Tiu verko estas elstara psikologia romano. Kvankam mi antaŭe legis ĝin almenaŭ dufoje en la originalo franca, mi multe ĝuis tiun tradukon. Multaj de la detektivaj romanoj de Simenon valoras relegadon. Per relegado oni pli bone komprenas la psikologion de la personoj kaj pli profunde sentas la tragedion. Tiu tragedio ne nur estas tragedio de iu murdo sed plej ofte tragedio de tuta vivdaŭro aŭ, pli precize, de iuj vivodaŭroj.</p> <p>Iun matenon Maigret ricevas sennoman leteron pri murdo okazonta. Estas facile - eĉ tro facile - malkovri la grandan luksan apartamenton, kie iu skribis la leteron. Kiam Maigret renkontas la dommastron (tiu estas fama, riĉa juristo kiu laboras pri mara juro), li trovas tre malaltan viron kiu ekscitiĝas renkonti la faman detektivon kaj kiu nur deziras diskuti sian plej ŝatatan temon, artikolo 64 de la Punkodo, kiu diras ke <i>delikto ne okazas kiam la faranto de la ago estas en stato de frenezeco en la tempo de la ago, aŭ kiam li estis devigita per forto, al kiu li ne povis rezisti</i>.</p> <p>Per iuj vizitoj Maigret lernas multe pri tiu s-ro Parendon, pri lia edzino, liaj infanoj, la kunlaborantoj kaj servistoj.</p>	<p>La apartamento situas en la najbarajo kie loĝas la Prezidento de la Respubliko. Ĝi estas impona domo kun <i>fenestrojn pli ol tri metrojn altaj</i>, kun grandaj portretoj, kun tre valoraj mebloj, kun multe da silento.</p> <p>Parendon, kiu similas gnomon, estas tre inteligenta. Lontempe li deziris diskuti artikolon 64 kun Maigret, kaj kiam Maigret aperas antaŭ li, tio estas kiel neantaŭvidita donaco.</p> <p>Ĉiuj en la domo, kun kiuj Maigret parolas, ne estas tiel bonvenigaj. Maigret ne povas fari multon utilan aŭ efikan, ĉar ĝis nun nenia krimo okazis.</p> <p>Iun tagon, kiam Maigret komencas esperi ke krimo ne okaos, li ricevas telefon Alvokon pri iu en la domo kies gorĝon oni tranĉis. Kun tiu homo li jam havis longan konversacion. Li trovis tiun tre simpatia. Nun li devas malkovri ties murdinton. Kaj fone ŝvebas artikolo 64. Ĉu la mortiganto vere, laŭleĝe, estas kulpa?</p> <p>Tre forte prezentiĝas la emocioj de Maigret, liaj frustracioj, timoj kaj esperoj. Iam verŝajne lia menso ne precize funkcias. Ideoj ŝvebas je la sojlo de konscio. Maigret iĝas grumblema.</p> <p>La aŭtoro celis grandegan legantaron, kiun li fakte atingis. Vendiĝis centmilionoj da ekzempleroj de liaj libroj. Unu el la kialoj por lia sukceso estas ke liaj libroj flue legeblas. Simenon konscie uzis negrandan vortstokon. Li tre zorge aranĝis la eventojn de la rakontoj kaj la perceptojn kaj eksciojn de la ĉefrolulo. Kiel la originalo, la stilo de la traduko estas klara kaj la esperanta versio legatas flue.</p> <p>Simenon, kiu verkis centojn da romanoj, estis majstro de la psikologia romano, kaj li uzis tiun majstrecon same kiam li verkis detektivajn romanojn. André Gide skribis: <i>Simenon estas la plej granda romanisto el ĉiuj, la plej vera romanisto kiun ni havas en la literaturo</i>.</p> <p>Tiuj kiuj legos <i>Maigret hezitas</i> ne nur ĝuos altnivelan detektivan romanon. Ili pliprofundigos sian komprenon pri la homa naturo.</p>
<p><b>Cotisations</b></p> <p>Les espérantistes et sympathisants de l'Eurégion sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant dès aujourd'hui l'une des cotisations suivantes au compte n°</p> <p><b>000-0245571-64</b> de: Esperanto grupo Rue Donckier 22 4800 VERVIERS</p> <p><b>A.P.E. 02-03 12 €</b> <b>U.E.A. 2003 50 €</b> <b>Senlime 2003 10 €</b></p> <p><b>en indiquant le nom du membre cotisant, le bénéficiaire et l'année: «cotisation de .... pour ....».</b></p> <p><i>La cotisation de Senlime est restée inchangée depuis sa création, il y a 10 ans.</i></p> <p><b>D'avance, merci à tous !</b></p>	<p>Sylvan Zaft, <b>LITERATURA FOIRO</b>, februaro 2000, n-ro 183</p>	